


## Leteroj de Tigro (5)

27<sup>an</sup> Aŭgusto, 2012

### Kion ni faru por Paco?

#### - pri la surinsuliĝo de kelkaj honkonganaj

Vizaĝoj de honkonganaj malofte aperis en internacia novaĵo. Sed la 15an de aŭgusto, kelkaj honkonganaj aperis en la novaĵoj tutmonde. Kia surprizo! Entute 14 honkonganaj penis surteriĝi en la insuleto *Diaoyu* (japane Senkaku), nordoriente de Tajvano. Kelkaj inter ili sukcesis surinsuliĝi kaj estis tuj kaptitaj de la japanaj policianoj.



Jen la historio. Ekde de fino de la 19a jarcento, per armiloj Japanio ekgajnis Rjukju-insularo (1879), Tajvano (1895), Manĉurio (1932). Post la milito, Usono ekokupis Rjukju-insularon kune kun la insuleto *Diaoyu*. Ĝuste tiam la politika situacio de Ĉinio estis ankoraŭ tre malstabla, kaj malgraŭ la protestado de Ĉinio kaj Tajvano, Usono en 1951 donis la reĝrajton de la insuloj al Japanio anstataŭ al Ĉinio aŭ Tajvano. La strategio de Usono dum la Malvarma Milito estis klara - Ĉinio estu ĉirkaŭitaj de usonaj amikoj: Sudkoreio, Japanio, Tajvano kaj Filipino. Jam pli ol 60 jaroj pasis. Malmultaj inter ni spertis la militon. Sed la insulo, same kiel la senvaloraj milit-biletoj (vd. *Ponteto* n-ron 252), estas kvazaŭ dornoj pikantaj la korojn de la ĉinoj.

### **Sed kial honkonganoj?**



Honkonganoj estas ĝenerale raciaj, praktikaj kaj pragmatismaj. Laŭ "leĝoj", la insulo jam apartenas al Japanio. Se oni malkonsentas, oni batalu leĝe aŭ politike ne alimaniere. En la okuloj de la japanoj, tiuj honkonganoj agis kontraŭ kaj leĝoj kaj ordinara senco kiel invadistoj. En la okuloj de la internaciaj spektantoj, ili aspektis kiel krimuloj, ĉar

senkonsidere, kion ili intencis, ili estis tuj arestita de la japanaj policianoj. Ĉu tio ne montris al la mondo, ke la insuloj apartenus al Japanio? (Kontraste kun Liancourt Rocks, kiun Koreoj arde defendis...) Kion tiuj honkonganoj deziras konkrete atingi? Ĉu eventuale la insuleto apartenu al Tajvano aŭ Ĉinio? Ĉiuokaze la insulo estas multe pliproksima al Ĉinio, Tajvano ol al Honkongo. Ĉu oni ne lasu al la politikistoj kaj registaroj solvi la problemon? Kion pensis tiuj honkonganoj?

La movado "protekti la insulon *Diaoyu*" havas longan historion en Ĉinio, Tajvano kaj Honkongo. Ĉinoj ne akceptis la "decidojn" kaj "leĝojn" fare de la usonanoj. La perdo de la insuleto al Japanio estas nacia honto. Aliflanke la ĉina registaro ĝis nun agas tre racie. Laŭ gvidantoj de *Deng Xiaoping* 鄧小平 ĝis *Hu Jintao* 胡錦濤, ne indas kaŭzi malharmonion inter la du nacioj pro insuleto. Anstataŭe, la du nacioj kunlaboru ekonomie, eĉ planante kune fosi petrolon en la Orienta Maro. Pri la surinsuliĝo, similaj klopodoj estis tamen multaj dum la pasintaj jarcentoj sed nur en 1996 kaj 2004 ĉinoj sukcesis surteriĝi. Pro tio ĉi-foje kelkaj laŭdis tiujn honkonganojn kiel naciajn heroojn; sed la plejmulto de honkonganoj fakte kritikis ties agon stultan kaj senfruktan - ĉar tio nur malstabiligas la rilaton inter Ĉinio kaj Japanio.

Multaj japananoj ne komprenas la ĉinan vidpunkton - almenaŭ tiun de la registaro - stabileco anstataŭ konflikto. Multaj japanoj timas pri la kreskiĝo de giganta Ĉinio. La nova ĉefministro Noda montris malamikan sintenon kontraŭ Ĉinio, firme deklarante la rajton de la insulo. Sekvis la propono de Ishihara Shintarō aĉeti la insulon kaj plano de surinsuliĝo de la parlamentanoj. Tiaj agoj stimulis la reagojn de la ĉinaj naciistoj kaj emociaj movadistoj, kiuj ne volas forgesi pri la invado kaj la sufero de la maljunuloj. Jen provoko nenecesa de la japana flanko.

La honkonganoj, kiuj surteriĝis la insuleton, ne komprenis, ke ties naiva ago nur stimulis reagon de la dekstristojn kaj ekstremistojn en Japanio. Jen provoko nenecesa de la ĉina flanko.

Se stultuloj de ambaŭ flankoj daŭre provokus unu la aliajn, la publiko eventuale ekkredos, ke konflikto vere okazos kaj okazu. La

fakto estas, ke konflikto estas nur imagita kaj ne realiĝu.

Ni ne forgesu - militoj kaj konfliktoj estas ĉiam la produkto de politikistoj, militaristoj aŭ simple naivaj stultuloj. Ili profitas pove kaj mone; la popolo suferas kaj mortas. Post la milito, Japanio fariĝis pacisma lando. Tio estas valora kaj prigardenda. Ĉar kiomlonge tiu pacismo daŭros oni neniam scias. Naciismo kaj ekstremismo kreskas ĉie, eĉ ene de Japanio. Tion eĉ multaj honkonganoj ne povas konstati. Ĉu la pacamantoj ĉie ne faru ion ankaŭ anstataŭ ol silente observi?



Lastsemajne en *Facebook*, mi ricevis kontraŭmilitajn afiŝetojn fare de Israelanoj. Kune kun la fotoj de iuj personoj, la vortoj sur la afiŝo estas "Ni amas vin, irananojn!" aŭ "Ni ne pretas morti en *via* milito". La irananoj reagis tre rapide kaj faris la saman. La mesaĝo estis klara - la popolo deziras pacon, ne militon. Mi aplaŭdas al tiu bela iniciato. Eble pacamaj samideanoj en Ĉinio kaj Japanio faru same. Se la voĉo de paco ne aŭdiĝu hodiaŭ, eble ĝi ne plu aŭdeblas morgaŭ.

- Tigro (*bill.m.mak@gmail.com*)